Dum la Granda Patruja Milito 11 635 homoj ricevis titolon "Heroo de Soveta Unio". Inter ili estas 131 niaj samregionanoj.
Dum la milito Uljanovsk iĝis granda industria centro. Al nia urbo estis evakuitaj 15 uzinoj kaj fabrikoj. Septembre de 1941 ĉi tie aperis aparata uzino. Dank' al ĝi fronto ricevis dum la milito preskaŭ 300 000 aviadajn aparatojn. Aprile de 1942 nia aŭta uzino komencis produktadi aŭtojn. Fine de 1943 oni produktis jam po 100 aŭtojn diurne.



La 6-an de majo 2005 antaŭ kartoĉa uzino estis inaŭgurita monumento al herooj de malfronto. Dum 4 militaj jaroj ĉi tie estis produktitaj pli ol 5 miliardoj da kartoĉoj. Tiu uzino estis unununura kartoĉa uzino en la lando, kiun oni ne evakuis.

Dum la milito nia urbo ricevis titolon "forĝejo de oficiroj". Ĉi tie lokiĝis 4 militistaj lernejoj: infanteria, du tankaj kaj sola en la lando lernejo por komunikistoj. Ili instruis dum la milito 12 000 oficirojn.
Honoron kaj suverenecon de nia Patrujo defendis 268 mil uljanovskanoj. Pli ol 125 mil pereis, mortis pro vundoj kaj malsanoj kaj pereis senpostsigne.



La 24-an de junio 1945 116 uljanovskanoj partoprenis faman Paradon de Venko en Moskvo



La 9-an de majo en Uljanovsk

Sur alta bordo de Volga troviĝas obelisko. Ĝi estis starigita en la jaro 1975 kaj memorigas nin pri tiuj, kiuj oferis sian vivon por ni. Tie brulas eterna fajro memore al falintaj herooj.
Ni ne forgesu ilin!

Aŭtoro: Margarita Karceva





# AL TAGO DE VENKO DEDIĈITA

Urba
Esperanto-klubo
100 jaroj

2010



**Polbin** Ivan Semjonoviĉ estis generalo de aviado  kaj estris aviadan bombkorpuson.
Li naskiĝis en familio de kamparano la 27-an de januaro 1905 en Majna-distrikto (vilaĝo Rtiŝĉevo-Kamenka). Titolon “Heroo de Soveta Unio” li ricevis dufoje (en 1942 kaj 1945). Ĝis aŭgusto 1942 li faris 107 batalelflugojn kiel regimentestro. Li pereis dum aerbatalo ĉe Breslau (nuna Wrocław, Pollando). Li estas poreterne enlistigita en sia milittrupo. Lia nomo estis atribuita al militista aviada lernejo en Orenburg. Lia naskovilaĝo havas nun lian nomon. Tie estas starigita lia busto. Monumentojn al la heroo oni povas vidi en Moskvo kaj Uljanovsk. Strato en nia urbo portas lian nomon. En oficira tombejo en Breslau la 8-an de majo 1985  estis starigita memora tomboplato sur lia simbola tombo.

**Matrosov** Aleksandr Matvejeviĉ – soldato, gvardiano, mitraletisto. Li naskiĝis en Dnepropetrovsk la 15-an de februaro 1924. Li kreskis en orfejo en Uljanovska regiono. La 23-an de februaro 1943 en vilaĝo ĉe  Pskov li ŝirmis per sia korpo paftruon de faŝista mitralo kaj kontribuis per tio al plenumo de batala tasko**.** Li estis tiam 19-jara. La 19-an de junio 1943 li estis postmorte titolita kiel “Heroo de Soveta Unio”. Tiu heroaĵo iĝis simbolo de kuraĝeco, sentimeco kaj amo al Patrujo. Sovetaj batalantoj ripetadis tiun heroaĵon pli ol 300 fojojn. Lian nomon portas stratoj en multaj urboj. Monumentoj al li lokiĝas en Ufa, Velikije Luki, Uljanovsk kaj aliaj urboj. Lian nomon havas orfejo, ŝipo, lernejoj. Niaj urbanoj nomis honore al li porinfanan parkon.





**Korjukin** Gennadij Petroviĉ – leŭtenanto, gvardiano, rotestro. Li naskiĝis en urbo Uljanovsk en la jaro 1924 en familio de laboristo. En la jaro 1942 li finis uljanovskan tankan militistan lernejon. La 26-an de aprilo 1944 li estis premiita, ĉar marte 1944 li sukcese transiris Dnestron per tri tankoj, faris 70-kilometran streĉan marŝon kaj la unua estis sur la alia bordo de Prut. Tiamaniere li aperis en malamika ariergardo kaj helpis al niaj trupoj sturmi urbon Ĉernovci. Lia roto likvidis 60 kanonojn, du tankojn, aliajn armilojn kaj multajn hitleranojn. Li pereis la 27-an de julio 1944 kaj oni entombigis lin en ukrainia loĝloko (Krjuĉkovec). Lian nomon portas strato en nia urbo.



**Ĥazov** Vladimir Petroviĉ – ĉefleŭtenanto, estris tankan roton. Li naskiĝis en vilaĝo Lava de Surskij distrikto la 9-an de septembro 1918. Profesie li estis veterinaro. Depost la jaro 1937 li servis en armeo. Tankan militistan lernejon li finis en 1939. En la fronto li estis ekde novembro 1941. Printempe de 1942 dum bataloj ĉe Ĥarkov li bruligis 10 malamikajn tankojn. Dum du juniaj tagoj de 1942 lia roto likvidis **31** tankojn. La 5-an de novembro 1942 li estis premiita. Li pereis ĉe Stalingrado la 13-an de septembro 1942. Li estis entombigita sur Mamajev-monteto en Stalingrado. Li estis enlistigita por ĉiam en Uljanovska Gvardia tanka militista lernejo. Stratoj en Volgograd, Surskoje kaj Uljanovsk portas lian nomon. Liaj kunbatalantoj nomis lin “blendita homo” pro lia firmeco, kuraĝo kaj traflerteco.

